

# EKO 2024

TRA LA  
MONDO  
IRAS FORTA  
VOKO

**Numero 2024:17; aprilo 27.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo : ILEI 283 KB. Sume 583 KB

## ILEI raportas regule kaj modele

La Ligo eniras novan etapon de kunlaboro pri la projekto <Landa Parad> (LAPA) kune kun la Fervojistoj kaj Komerlistoj (IFEF kaj IKEF). Aperas informoj pri la ILEI-kongreso en Maceio, Brazilo. 2024. Aliĝilo jam estas ĉe: [2024.kongreso.org](https://2024.kongreso.org).

La 17-an de marto la Prezidanto de LKK, s-ro Aristophio Alves Filho, prelegis pri la 57-a ILEI kongreso en Brazilo ĉe IKEF. Jen estas la filmeto pri la kongresejo: <https://youtu.be/tdMIUySeqHI?si=DjMOazu35Kz8MQb8>

Telegramstilo. Pliaj temoj estas ILEI-forumoj; instruistaj trejnadaj: intaj kaj ontaj; novaj kursoj de Esperanto; eventoj enkadre de la Jaro de Interkultura Kompetento 2024; nova konkurso kadre de la projekto Premio La Torre; universitata agado; omaĝe al 75-jariĝo de ILEI; IPR kaj JA; sciencaj esploroj pere de Esperanto kaj por ĝi; novaj publikaĵoj. Ni alkroĉas la plenan formon de la raporto, kiu estas 8-paĝa sed svelta.

## Realeca televido?

Ne ekzistas esperantlingvaj televidstacioj, sed povas ekzisti Esperantlingva realec-televido. La unua tia serio nomiĝas *Esperanto Senlime* kaj estis produktita de TEJO kun subteno de Eŭropa Unio. La unua epizodo spektoblos en la reto post iom pli ol monato.

Vojaĝkonkursoj estas unu el la variaĵoj de tiel nomata realec-televido – televida serio, dum kiu la partoprenantoj devas fari specifan vojaĝon, plenumante diversajn taskojn kaj defiojn. Konata ekzemplo estas la usona *The Amazing Race*, en kiu duopaj teamoj devas ĉirkaŭveturi la tutan mondon. En tiu serio aperis pli ol 400 epizodoj dum 36 sezonoj.

La esperantista variaĵo estas iom pli senpretenda. En la unua sezono de *Esperanto Senlime*, kies unua epizodo spektoblos la 18-an de majo, la 17 partoprenantoj vojaĝas el Roterdamo al Barcelono. La projekto estis financita de EU kadre de la



programo Erasmus+ kaj realigita de TEJO. Origine la projekto daŭrigas la emon en TEJO realigi pli kaj pli amuzajn kaj frenezajn ideojn, kion ni komencis per la muzikalaj projektoj. La ideo estas fari ion kion junuloj ĝuas kaj estas *per* kaj *en* Esperanto anstataŭ *por* Esperanto. Alivorte, fari ion por la komunumo, ne por varbi, instrui aŭ simile, rakontas Carlos Pesquera Alonso.

Li estas subvencipetisto de TEJO, kaj havis la ĉefan respondecon pri la produktado de la serio. La subvencion de € 20 000 ricevis TEJO kune kun siaj landaj sekcioj en Katalunio, Francio kaj Germanio kadre de la temo de interkulturo kaj zorgo pri la medio. Patroprenis la landaj sekcioj en Pollando kaj Litovio. La partoprenantoj veturas trajne per *Interrail*-karto (**SMG**: Brave!), sed ankaŭ petveture. La vojaĝo daŭris dek tagojn, kaj kun helpo de lokanoj oni preparis taskojn por la partoprenantoj en ses urboj en kvar landoj.

## Mil kaj unu noktoj nun en Esperanto

Espéranto-France ĝojas publikigi *La libron de la mil kaj unu noktoj*, ĉefverkon de la monda literaturo. Tio estas ampleksa kolekto de rakontoj, kiuj venis al ni tra la jarcentoj. Danke al Antoine Galland, kiu tradukis kolekton de ĉi tiuj rakontoj en la francan komence de la 18-a jarcento kaj, tri jarcentojn poste, al Daniel Moirand, kiu esperantigis ilin, ankaŭ vi povos sperti tiujn mirindajn rakontojn, tiujn rakontojn ene de rakontoj, kiuj transportos vin al diversaj orientaj landoj en diversaj epokoj, kiel ĉiunokte faris Ŝeherazad (Ŝahrzad) por vekti la scivolemon de la sultano (ŝaho) kaj eskapi sian fatalan sorton. Entute **1600 pàgoj** en **tri volumoj**, ilustritaj per **430 desegnoj** de famaj artistoj. La libro estas parto de la **Serio Oriento-Okcidento** de UEA, sub la numero 63.



## Gepatra lingvo refoje en Slovenio

Ĉi-jare ni festis la Tagon de la gepatra lingvo, la 21-an de februaro, en Ljubljano dum la jarkunveno de la Eo-societo Ljubljano. Gasto el Mariboro, Mario Vetrh, prezentis la historion de la festotago kaj la noción de gepatra lingvo per 26 lumbildoj. La motivo por tia internacia memortago estis la luktado por lingvaj rajtoj de le parolantoj de la bengala lingvo en tiama Orienta Pakistano dum la kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento.

Fonto: La informilo de la Slovena Asocioj, red. Ostoj Kristian

## Aruŝa: Homo, lingvo kaj medio por pli bona mondo

Tio estas la kongresa temo por la UK en Aruŝa. Lingvo estas komunikilo. Ĝi ebligas al ĉiuj esprimi siajn pensojn kaj sentojn ĉu voĉe, signe aŭ grafike. Tiel ni povas transdoni mesaĝon al la esperantista kaj la neesperantista publikoj. Lingvaj diferencoj estis kaj estas je la bazo de pluraj etnaj konfliktoj, kiuj kreas murojn aŭ

barojn inter homoj. Tio estas videbla en pluraj konfliktoj, kiuj kaŭzas milionojn da mortoj, vundoj kaj migrado tra la mondo.

Fronte al tiuj problemoj, Esperanto prezentiĝas kiel bona alternativo. La lingvo celas antaŭenigi pacon kaj interkompreniĝon inter homoj. Temas pri lingvo de malkovro, malferm(iĝ)o kaj de proksimigo inter ĉiuj homoj, ĉar ĝi ne ekskludas aliajn lingvojn. Esperanto estas uzata kiel lingvo por kultura kaj socia integriĝo. Danke al ĝi, homoj lernas aliajn lingvojn, kiujn ili neniam malkovrus aŭ ne lernus. Aliaj personoj interesiĝas pri dialektoj dank' al Esperanto. Ekzemplas la kazo de la lernado de la evea lingvo (okcident-afrika lingvo, parolata en Togolando, Ganao kaj Benino) kaj la svahila (orient-afrika lingvo parolata de pli ol 200 milionoj da personoj). Tiu ĉi lasta estos instruata dum la kongreso en Aruŝo.

Esperantistoj sentas sin hejme ĉie kaj sekuraj en siaj persona kaj kultura identecoj. Tion ekz. ilustras Pasporta Servo, kiu faciligas la senpagan gastigon de esperantistoj tra la mondo. Esperantistoj kunhavas komunajn valorojn, kiel respekto al la lingva kaj kultura diverseco, la antaŭenigo de la paco kaj la internacia kunlaboro, kaj la engaĝiĝo por daŭripova kaj solidara evoluigo.

Ni alfrontas problemojn de medio, kiel la naturaj katastrofoj, la klimat-ŝanĝiĝo, ŝrumpado de biodiverseco kaj poluado. Tanzanio estas taŭga gastiganto por tiu kongresa temo – la sola afrika lando, kie la loka lingvo svahila estas uzata oficiale en la lernoprogramo kaj en la publikaj instancoj. En la lando altnivelaj esploroj okazas rilate al medio. Tie ni oportune studos la fenomenon de lingvo kaj medio ankaŭ en aliaj mondopartoj. Ni krome analizos la temon el pli vasta, naturscienca vidpunkto: pli bona mondo instigas demandojn pri mediprotektado, biologia agrikulturo, uzo-neuzo de fosiliaj energioj kaj sana medio. Ni analizos kiun rolon ludu la Eo-movado por solvi problemojn aperantajn pro homaj agoj el vidpunkto de lingvo kaj klimat-ŝanĝiĝo.

Reĝisoro de la kongresa temo estas François Hounsounou (Benino). Vicreĝisoroj estas Espoir Kasati (Kongo DR), Cyprien Guiya (Benino) kaj Miora Raveloharinson (Madagaskaro). Ĉiuj estas multjaraj esperantistoj kaj aktivas surloke pri Esperanto, lingvoj, homaj rajtoj kaj naturmedia agado. Por kontakti la reĝisoran teamon pri la kongresa temo skribu al [KongresaTemo@groups.io](mailto:KongresaTemo@groups.io).

Supre iomete koncizigita versio de la kongrestema teksto. Por la plena versio:

[Teksto el la Dua Bulteno de la 109-a UK de Esperanto, Aruŝo, Tanzanio, 3-10 aŭgusto 2024.](#)

[Retejo de la Kongreso](#)

## Aliĝoj al Aruŝa bone progresas

En la 27-a de aprilo aliĝoj por la UK en Aruŝa kreskis ĝis 441 personoj el 55 landoj: Germanio 48, Francio 42, Italio 30, Ĉinio 26, Koreio 26, Japanio 22, Usono 21, Pollando 17, Belgio 17, Tanzanio 16, Brazilo 16, Britio 13 kaj Hispanio 12.

## Verde kaj facile

<https://uea.facila.org/artikoloj/movado/asocio-de-verduloj-esperantistaj-r424/>

## Kursoj koree kaj argentine

La redaktoro de [edukado.net](http://edukado.net) informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Nova kurso

Gvidantonomo kaj aldoninto: Ruben Sanchez

Loko: Neuquen, Argentino

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27627>

Nomo: Iri Baekjae elementa lernejo

Gvidantonomo: Gim linhye(Ella); Aldoninto: kih4860

Tipo: Nova lerneja kurso

Loko: Iksan, Korea Respubliko.

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27640>

## Nova kalejdoskopio el Irano

Proveksemplero de Kalejdoskopio estas havebla ĉe la retlisto 'landa agado' ĉe <https://groups.io/g/esperanto-landa-agado/message/1767>. 18 paĝoj, A4, kolora,

abonkotizo: 5 eŭroj. **Retadreso por elŝuto:**

[https://groups.io/g/esperanto-landa-agado/attachment/1767/1/Kalejdoskopio+1%20\(2\).pdf](https://groups.io/g/esperanto-landa-agado/attachment/1767/1/Kalejdoskopio+1%20(2).pdf)

===== vortoj: 1235 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.  
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikiloj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

## La unuaj dek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

**ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@ gmail.com>. Por forigok, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apertenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikilojn pere de retlisto.